

En la PDF-versio povas manki kelkaj partoj de la enhavo.

Enhavo

1	The German Interlinguistics Society (Seán Ó Riain).....	2
2	Aranĝoj.....	9
2.1	19-a kongreso de Japana Asocio de Sociologio por Emancipiĝo (Kimura Goro).....	9
2.2	Gastprelego pri Esperanto en Sankt-Peterburga Universitato (V. Slavik Ivanov)	11
2.3	6-a interuniversitata scienca konferenco de studentoj - filologoj (Povilas Jegorovas).....	11
2.4	Kongreso de MANYE en Győr (Bujdosó Iván).....	12
2.5	Tria semestro de interlingvistikaj studoj 2003 en Poznań (Ilona Koutny).....	14
2.6	En la universitato de Vilnius (Povilas Jegorovas).....	15
2.7	Studenta scienca konferenco en Riga (Povilas Jegorovas).....	15
2.8	En Potsdam: Pri mondlingvoj en Sankt-Peterburgo.....	16
2.9	13-a konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.....	16
3	Du novaj artikolaroj de GIL.....	17
4	Esplor-tekstaro realigata.....	19
5	Varbu por Ipl !.....	19

1 The German Interlinguistics Society (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.)

Seán Ó Riain

En IpI ni publikigas diverslingvajjn materialojn, kompreneble ĉefe en Esperanto. Tamen, ĉar interlingvistoj estas interesitaj pri sciencaj temoj, ili ja kutimas sekvi fakajn materialojn ne nur en Esperanto, sed en diversaj lingvoj.

Pro tio ni publikigas anglalingvan tekston pri la jam kelkfoje menciita germana interlingvistika organizaĵo. La teksto aperis en iom alia formo en "Language Problems & Language Planning" 27(2003)3, p. 269-277. Eble ĝi iom helpas pripensi, ĉu ne ankaŭ en aliaj landoj povus esti fondataj similaj organizaĵoj.

En ĉi-tiu eldono de IpI vi ankaŭ trovos informojn pri la lasta konferenco de GIL (p...) kaj la lastaj GIL-eldonaĵoj.

Red.

The German Interlinguistics Society (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.) was founded in Berlin by 12 German interlinguists on 6 April 1991. The Society's aims are to bring together interlinguistics and esperantology scholars, mainly in Germany, and to increase their activity; to heighten awareness of, and facilitate access to, international specialist literature as it appears; to promote the interchange of expertise and the publication of members' work; and to provide an opportunity for activity in the framework of a professional linguistic organization. GIL's principal fields of activity are:

- The dissemination of interlinguistic knowledge and the promotion and support of relevant research and teaching
- The support of national and international cooperation among interlinguists
- The concentration of its specialist activities in the following main fields
 - + international linguistic communication
 - + language planning
 - + esperantology
 - + the teaching of Esperanto and interlinguistics at universities and institutes of higher education.

Although essentially a German organization, GIL also has members from Austria, China, Finland, Hungary, Japan, Croatia, the Netherlands, Poland and Switzerland.

The Society publishes the bibliographical bulletin "Interlinguistische Informationen", of which 45 editions have appeared by the end of 2002. GIL organized a specialist conference each year, and has published the proceedings since its fifth conference (1995).

Previous conference themes were:

1. Founding conference, 6 April 1991. No framework program.
2. "Interlinguistic Aspects of European language policy", 16–18 October 1992.
3. "Linguistics and Interlinguistics", 15–17 October 1993.
4. "Esperantology", 18–20 November 1994.

Since 1995 the proceedings of GIL's annual conferences have been published.

The following eight volumes have appeared to date:

1. *Translation in Plansprachen*, 1996. 71 pp.
2. *Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik*, 1997. 51 pp.
3. *Eine Sprache für die Wissenschaft*, 1998. 120 pp.
4. *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen*, 1998. 60 pp.
5. *Interlinguistik und Lexikographie*, 1999. 91 pp + 33 pp.
6. *Sprachenpolitik in Europa*, 2001. 161 pp.
7. *Zur Struktur von Plansprachen*, 2001. 159 pp.
8. *Plansprachen und ihre Gemeinschaften*, 2002. 161 pp.

References to Esperanto are sometimes greeted by a wry smile conveying a "been there, done that, what's next?" attitude. In the present reviewer's experience, this reaction is as common in professional linguistic circles as among fellow diplomats, to whom the science of interlinguistics appears as little known as it is to the wider public. In an area more characterized by prejudice

than hard scientific knowledge, the eight volumes of GIL proceedings represent an important linguistic contribution towards remedying this lacuna. Crucial in maintaining the lack of knowledge of planned languages is a failure to appreciate the fundamental difference between the over 1,000 planned language projects and the one such language, Esperanto, which has gone through each of the 28 stages of development outlined by *Blanke*¹ to become a fully functional language, used intensively and increasingly by a worldwide language community.² Even a little familiarity with developments in interlinguistics³ should help dispel what Piron calls *l'ignorance ignorée*.⁴

Each volume contains 8-14 academic contributions by interlinguistics specialists, and an introduction by Detlev Blanke, first president of GIL. The exception is **Volume three**, which has just four contributions dealing with a colloquium in memory of Nobel Prize-winning scientist and interlinguist *Wilhelm Ostwald* (1853-1932), who perceptively foresaw many of the negative effects of the international dominance of an ethnic language which have developed since his death (p 21, 28)⁵. The published proceedings consist of a total of 84 contributions. Most focus on planned languages, but by no means exclusively on Esperanto, whose linguistic and meta-linguistic features are often compared to those of competing language projects.

¹ Blanke 2001: 53-57, in Schubert 2001.

² Evidence of the actual use of Esperanto, and of the existence of a specific Esperanto culture, is provided by Chiti-Batelli 1987, Janton 1993, Piron 1994, Gledhill 1998, Nuessel 2000, Ó Riain 2001, Zaft 2002. Its use in diplomacy is testified by (former Australian Ambassador) Harry 1994 and Ó Riain 2001.

³ Fiedler & Liu 2001 contains scholarly articles by 43 authors from 19 countries. Fiedler 1999 establishes conclusively the existence of a substantial body of phraseology in Esperanto, honed by almost 120 years of usage and comparable to national languages. Schubert 2001 ranges from the role of literary language in Esperanto (Tonkin) through lexicography (Duc Goninaz), speech processing (Koutny) to Creoles and pidgins (Liu). It is not necessary to give further detail to LPLP readers.

⁴ Piron 1994 : 257.

⁵ See also Phillipson 2003 and Cushing 1994.

Arguably the most topical volume, as we approach EU enlargement on 1 May 2004, is *Sprachenpolitik in Europa*, which appeared in 2001 (**Volume six**). The decision of the Seville European Council in June 2002 to consider the use of languages in an enlarged EU adds to its topicality. It contains contributions on multilingualism – curse or blessing (*Mattusch*); the typological richness of European Languages (*Lötzsch*); Russian as an international language (*Kostomarov*); the French view on language policy (*Klare*); planned languages and European language policy (*Blanke*); an epilogue to the conference on language policy in Europe (*Scharnhorst*); forestry terminology (*Simon and Ullrich*); the translation of Goethe’s Faust into Esperanto (*Fiedler*); “Does Europe exist? What is European?” (*Barandovská-Frank*); and a useful bibliography on language policy in Europe (*Blanke/Scharnhorst*).

Mattusch (p 21) quotes UNFPA figures predicting that in 2050 neither French, German nor Italian will be among the 20 most spoken languages. They will be replaced by Turkish, Persian and Amharic, with Swahili possibly replacing Korean, English dropping to place three, behind Chinese and Hindi, and Russian holding its position. A further striking prediction is that the current 10% Spanish-speaking population of the US may increase to 25% by 2050. It is difficult to quarrel with Blanke’s conclusion (p 100): “To avoid future conflicts in Europe, language policy must be formulated democratically, particularly in the EU framework.”

It is clear that the principles of effective communication and the equal rights of all EU citizens may clash. The present drift towards English as the EU *lingua franca* tends to reinforce inequality between the 16% of native speakers of English and everybody else. *Phillipson* 2003 makes a strong case against allowing this drift to continue, and (p 184) in favor of serious consideration of a role for Esperanto in areas such as “a bridging or pivot language... for EU-internal communication”, or pilot studies on the possible contribution of short

preliminary courses in Esperanto to improving language learning in general.⁶ EU enlargement is clearly dictating more overt consideration of language policy. The need for a “EU standing conference of politicians and linguists” to establish and guide this discussion is stressed by *Scharnhorst* (p 110).

Volume one is devoted to translation and planned languages, and contains 11 contributions mainly on translation into Esperanto, but also on Greek, and cataloguing in Esperanto libraries. An introduction by Blanke explains GIL’s *raison d’être* and underlines the key role played by translation in Esperanto’s evolution from a project to a living language. Also covered are machine translation, translation models, translation in structured finance, phraseology, dictionaries to promote active use of a foreign language, geographical names, culinary terms, and a general article on Esperanto in Greece.

Volume two concentrates on terminological problems. Its eight articles deal with forestry terms; the borrowing of international terms v. the use of native resources in Esperanto and German; numerals; the Internet; Esperanto’s less successful offshoots; among other topics. Of note is *Wera Blanke*’s article on the contribution of interlinguists to the international organization of terminological work in general, in which she illustrates the important roles of *Eugen Wüster* and *Ernest Drezen*. The latter was executed during Stalin’s purges (p 6).

Volume four has 11 articles on the socio-cultural aspects of planned languages, two of which, in breach of GIL practice that all formal proceedings are conducted in German, are in Ido and Interlingua. There is a report by *Barandovská-Frank* of a world congress in “living Latin”, attended by 300

⁶ Corsetti & La Torre 2001

participants (in contrast to 2,000-3,500 at its Esperanto equivalents), and two contributions on the German orthographic reform (*Back and Löttsch*).

Volume five contains nine contributions on lexicography, including one on Bahasa Indonesia (*Krause*), and an annex presenting extracts from the various kinds of dictionaries discussed. The conference theme was timely as it took place a few months after the publication of *Erich-Dieter Krause's* monumental “Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch”, containing some 80,000 head-words and copious examples of usage.

Volume seven has nine articles on the structure of planned languages, including Ido, Latino sine flexione, Occidental, Interlingua, Loglan, Klingon, as well as Esperanto. *Anton's* and *Fiedler's* articles compare the structure and development of Esperanto with that of its offshoot, Ido, the former grammatically and the latter phraseologically. *Günkel* writes on criticisms of the structure of Esperanto, and on attempts to address these in subsequent planned language projects. A broad tentative conclusion from this volume tends to indicate that the relative success of Esperanto, when measured against all rivals, has little to do with linguistic structure. Neither any of the “improvements” on Esperanto, nor the naturalistic Interlingua and similar projects, led to more widespread use or recognition. On the contrary, the stability of Esperanto over more than a century, and its internal coherence in actual usage throughout the world, probably helped it outdistance all rivals. In any case, a dispassionate examination such as this volume contains, with contributions from advocates of Ido and Interlingua, is very useful.

Volume eight deals with planned languages and their communities in 14 articles. They include the *Academia pro Interlingua* (*Barandovská-Frank*); Ido (*Anton*); Occidental/Interlingue (*Back*); Interlingua (*Wilshusen*); “living Latin”

(*Fritsch*); “Comics – the Esperanto of the Illiterate” (*Fiedler*); Klingon (*Mannewitz*); a sociological survey of the speakers of Esperanto (*Stocker*); the Swiss planned languages encyclopedia project, and the Swiss contribution to the planned languages movements (*Künzli*); forestry terms (*Simon/ Weckwerth/ Weidner*); the gender neutrality of the Esperanto pronoun system (*Fischer*); the metaphorical use of the term “Esperanto” (*Blanke*); and language planning in Ireland (*Ó Riain*).

The proceedings of GIL constitute a veritable treasure trove for all who are interested in international communication. I warmly recommend them.

About the reviewer

Seán Ó Riain (Ph.D., Trinity College, Dublin) has published research on language planning in Ireland and Québec (*Ó Riain 1994*). His diplomatic career has included Poland, Australia, Austria and now Berlin. The Minister for Foreign Affairs of Ireland, Mr Brian Cowen, TD, launched his booklet on EU language policy (*Ó Riain 2001*) on 12 July 2001. He is president of the European Esperanto Union, the umbrella organization of the national Esperanto associations in the 15 EU member states. sean.oriain@iveagh.irlgov.ie

References

- Blanke, Detlev. 2001. *Von Entwurf zur Sprache*. In Schubert 2001, p 37-89.
- Corsetti, Renato, & La Torre, Mauro. 2001. *Ĉu klara strukturo estas instrua?*, in Schubert 2001 pp 179-202.
- Chiti-Batelli, Andrea. 1987. *Communication Internationale et Avenir des Langues et des Parlers en Europe*. Nice : Presses d'Europe.
- Cushing, Steven. 1994. *Fatal Words – Communication Clashes and Aircraft Crashes*. Chicago & London: The University of Chicago Press.
- Fiedler, Sabine. 1999. *Plansprache und Phraseologie*. Frankfurt am Main: Peter Lang.
- Fiedler, Sabine, and Liu Haitao. 2001. *Studioj Pri Interlingvistiko/Studien zur Interlinguistik – Festlibro por/Festschrift für Detlev Blanke*. Prague: Kava-Pech.
- Gledhill, Christopher. 1998. *The Grammar of Esperanto – a corpus-based description*. Munich: Lincom Europa.
- Harry, Ralph. 1994. *Aventuroj en Esperantujo*. Sydney: Libroservo de Aŭstralia Esperanto-Asocio.
- Janton, Pierre. 1993 (translated by H. Tonkin, J. Edwards, K. Johnson-Weiner). *Esperanto: language, literature and community*. Albany: State University of New York.
- Krause, Erich-Dieter. 1999. *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. Hamburg: Helmut Buske.

- Nuessel, Frank. 2000. *The Esperanto Language*. New York/Ottawa/Toronto: Legas.
- Ó Riain, Seán. 1994. *Pleanáil Teanga in Éirinn* (Language Planning in Ireland) 1919-1985. Baile Átha Cliath (Dublin): Carbad/Bord na Gaeilge.
- Ó Riain, Seán. 2001. *The EU and the Irish Language: Identity and Linguistic Diversity* (bilingual Irish/English). Baile Átha Cliath (Dublin) & Corcaigh: Clódhanna Teo.
- Phillipson, Robert. 2003. *English-Only Europe – Challenging Language Policy*. London and New York: Routledge.
- Piron, Claude. 1994. *Le Défi des Langues – Du gâchis au bon sens*. Paris : L'Harmattan.
- Schubert, Klaus (ed.). 2001. *Planned Languages: From Concept to Reality*. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst.
- Zaft, Sylvan. 2002. *Esperanto – A language for the Global Village*. Calgary: Esperanto Antaŭen.

2 Aranĝoj

2.1 19-a kongreso de Japana Asocio de Sociologio por Emancipiĝo (22-23.3.2003, Chukyo-Universitato, Nagoya)

Kadre de la supre menciita aranĝo okazis kunsido sub la temo “Lingvo, povo kaj diskriminacio”, en kies kadro estis prezentitaj jenaj prelegoj:

KIMURA Goro C.: Kio estas lingvaj rajtoj?

ABE Yasusi: Japana skribsistemo kiel malhelpo

ITOIGAWA Miki: Lingva diskriminacio en kontraŭdiskriminaciaj akademiaj movadoj

KADOJA Hidenori: Eblecoj de Esperanto kiel movado kontraŭ diskriminacio

Estas malofte, ke en sociologia konferenco en Japanio prezentiĝas lingva problemo, eĉ pli malofte, ke prezentiĝas Esperanto. Tiun aranĝon ebligis prof. *MASIKO Hidenori*, profesoro pri sociologio ĉe Chukyo-universitato, kiu mem estas esperantisto.

En la kunsido ĉeestis c. 50 homoj - ĉefe sociologoj kiuj okupiĝas pri diversaj diskriminacioj en la japana socio.

KIMURA enkondukis en la temon prezentante bazajn ideojn de "lingvaj rajtoj".

ABE kaj *ITOIGAWA* koncentriĝis pri konkretaj ekzemploj de lingvaj diskriminacioj en la japana akademia mondo: *ABE* parolis pri la problemo de la komplika japana skribsistemo, kiu ekskludas ne nur malpli edukitajn japanojn sed ankaŭ blindulojn kaj eksterlandanojn.

ITOIGAWA analizis lingvajn diskriminaciojn en fakaj gazetoj kontraŭ diskriminacio, ekz. inismaj fakgazetoj, kaj atentigis, ke eĉ fakuloj pri diskriminacio tendencas ne atenti pri lingvaj diskriminacioj. Fine, *KADOJA* prezentis la esperanto-movadon kiel ekzemplon kontraŭbatali lingvajn diskriminaciojn.

Post la prezentaĵoj viglis diskuto kun la aŭskultantaro. Ĉefe la kontribuo al la diskutado de fakuloj pri handicapitoj, kiuj atentigis pri komunikadaj problemoj de blinduloj kaj surduloj, montriĝis utila por klarigi la esencon kaj signifon de lingvaj rajtoj. Eble tiun rilaton ĝis nun oni ne sufiĉe atentis. Dialogo kaj kunlaboro kun tiutemaj fakuloj certe estos fruktodona por evoluigi konceptojn pri lingvaj diskriminacioj. Aliflanke ne malmultaj ĉeestantoj prezentis sian singardon rilate al Esperanto. La argumentoj estis la konataj: tro utopia, ne havas kulturon, disfalos en dialektoj ktp... Ĝenerale la podianoj sentis, ke indas daŭrigi tiajn provojn de diskuto kun fakuloj ne prilingvaj, sed pri aliaj diskriminaciaj problemoj. (KIMURA Goro)

2.2 Gastprelego pri Esperanto en Sankt-Peterburga Universitato

La 23-an de aprilo 2003 en *la filologia fakultato de Peterburga Ŝtata Universitato* okazis gastprelego pri Esperanto, kiun gvidis *Vjaĉeslav Ivanov*, postdiploma studanto kaj asistanto de la katedro de matematika lingvistiko. La prelego iĝis parto de kurso "Lingvoj por Specialaj Celoj" gvide de prof. *Aleksandr Gerd*, la katedestro.

La ĉeestintaj studentoj (tria studjaro de fako "Matematika kaj aplikata lingvistiko") havis eblecon konatiĝi kun PAG, NPIV, Eo-gazetoj, sciencaj eldonoj (ĉefe esperantologiaj, ankaŭ "IpI") k.a. Ĉiuj ricevis A4-folion kun ekzemplaj frazoj en Esperanto kaj iliaj "subliniaj" tradukoj, sur la samaj folioj estas indikita ligo al la teksto de la prelego en la Reto: <http://lekcio.narod.ru/>.

Espereble, prelegoj pri Esperanto ekde nun iĝos konstanta parto de la menciita kurso "Lingvoj por Specialaj Celoj" kadre de la katedro.

(Laŭ *Vjaĉeslav Slavik Ivanov*, Peterburgo, Rusio)

2.3 6-a interuniversitata scienca konferenco de studentoj-filologoj

La 7-11-an de Aprilo, 2003, en la Sankt-Peterburga ŝtata universitato okazis la *6-a interuniversitata scienca konferenco de studentoj-filologoj*, en kiu partoprenis la sekretario de Litova Esperanto-Asocio s-ino *Aida CIZIKAITE*. En la sekcio de baltistiko ŝi legis raporton pri la temo "Transitivaj verboj en la litova kaj en Esperanto". La resumo de ŝia prelego aperis en presita materialo de la konferenco kaj en la programo de la konferenco. Ŝi studas filologion en la magistra fako de humanisma fakultato en Kaunas de la Vilnusa universitato. Pasintjare ŝi finis la bakalaŭran fakon en la filologia fakultato de la Vilnusa universitato kaj defendis diplomprojekton laŭ la sama temo. Ŝia gvidanto de la diplomverko estis profesoro *Laurynas Algimantas SKUPAS*, antaŭa prezidanto

de Litova Esperanto-Asocio. Oponanto kaj recenzinto estis *Povilas JEGOROVAS*, nuna prezidanto de LEA. Ŝi samtempe ankaŭ studas interlingvistikon kaj esperantologion en la universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando). Dum antaŭaj jaroj en la Vilnusa universitato kaj en aliaj litoviaj altlernejoj estis defenditaj almenaŭ 5 diplomprojektoj, ligitaj kun Esperanto (*Povilas JEGOROVAS, Laimius STAZNICKAS, Rolandas STRAMKAUSKAS, Valerijus RUDZINSKAS* k.a.).

(*Povilas JEGOROVAS*, Litova Esperanto-Asocio litova.ea@mail.lt)

2.4 Kongreso de MANYE en Győr

La kongreso de Asocio de Hungaraj Apliklingvistoj (hungara mallongigo: MANYE) okazis de la 14-a ĝis 16-a de aprilo 2003 en la universitata urbo Győr.

Oni prezentis jenajn prelegojn en la plenkunsido:

Evelyne Glaser: The multilingual Europe and the lingual imperialism of English – two compatible aims?

BÁRDOS Jenő: Aksiomoj de aplikata lingvistiko en la lingvopedagogio

Rondtablaj diskutoj:

1. *Multkultureco - ĉu Svisio povas esti modelo?*

2. *Ĉu oni povas realigi la plurlingvecon en la lerneja instruado de fremda lingvo?*

Laŭ la tutlanda statistiko la vicordo de la lingvoj laŭ la ekzamenitoj en 2002: angla, germana, Esperanto, franca, cigana: lovani/romani, ...

La ekzamenrezultoj de la cigana ĝis februaro en 2002 estis ekstreme bonaj. Tiam oni ŝanĝis la ekzamenantojn kaj la rezultoj fariĝis averaĝaj. La rezultoj de Esperanto ĉiam estis mezaj. Estas laborgrupo en la Eduka Ministerio por prijuĝi la lingvo-ekzamenojn. Mi povis paroli post la kunveno dum ĉ. 40 minutoj kun la referento de tiu ĉi grupo pri la dezirindeco de allaso de ekzamenoj en Esperanto.

3. *Eklezioj kaj konfesioj en la plurlingva Eŭropo.*

4. *La Projekto CERNET kaj la viena Eŭropa Mezlernejo.*

5. *Ĉu ŝanĝigos la hungara lingvo en la plurlingva Eŭropo? Se jes, kial kaj kiel?*

Sekcioj [prelegoj de esperantistoj aparte menciataj]:

1. *La (instruado de la) hungara kiel fremda lingvo enlande kaj eksterlande.*

2. *La mezuro kaj taksado de alproprigo de fremda lingvo.*

BUJDOSÓ Iván: Ĉu vi konas la hungaran? Spertoj de skriba lingvo-ekzameno de Esperanto ĉe ITK Origo.

3. *EU - plurlingveco.*

BENCZIK Vilmos: Lingvopolitikaj dilemoj de Eŭropa Unio.

4. *Kontrastiga lingvistiko.*

5. *Interkultura komunikado.*

6. *Lingvistiko kaj instruado de gepatra lingvo.*

7. *Lingvopolitiko, lingvoplanado.*

8. *Psikolingvistiko.*

9. *Faklingva komunikado "A".*

10. *Faklingva komunikado "B".*

11. *Komputa lingvistiko: Leksikografio kaj korpuslingvistiko.*

KOUTNY Ilona: Vortar-farado kun la apogo de korpuso.

12. *Sociolingvistiko.*

Ferma kunsido:

MEDGYES Péter, vicŝtatestretario de Eduka Ministerio konigis la politikon de la registaro pri lingvolernado. 2004 estos la Jaro de la Lingvolernado.

Oni permesas (kaj fincas) al ĉiuj mezlernejoj, ke ili enkonduku unu t.n. nulan klason, kie oni almenaŭ en 40% lernas lingvo(j)n.

Mia konkludo: Se oni lasus al la hungaraj studentoj libere elekti, restus nur 3 aŭ 4 lingvoj lernataj: angla, germana, Esperanto kaj eble la franca. Tiujn prenas utilaj 87% de la tuta ekzamenitaro. Esperanto rolas bone pro la deviga lingvoekzameno, sed ĝi povus montri multe pli belan statistikon, se ĉiuj superaj lernejoj akceptus ĝin.

(*BUJDOSÓ Iván*)

2.5 Tria semestro de interlingvistikaj studoj 2003 en Poznań

La partoprenantoj de la tria semestro de la Interlingvistikaj Studoj en la universitato Adam Mickiewicz en Poznań el diversaj landoj (de Pollando ĝis Irano) inter la 21-26-a de septembro 2003 ĉeestis la kursojn de *d-ro Detlev Blanke* kaj *d-ino Věra Barandovská-Frank* pri interlingvistiko, de *d-ro Vilmos Benczik* pri la tria periodo de Eo-literaturo, de *d-ro Blazio Wacha* pri semantiko kaj leksikologio kaj de *d-ino Ilona Koutny* pri esperanta sintakso. *Wera Blanke* prezentis la problemojn de la terminologia agado.

El la antaŭa grupo *Jitka Skalická* (Ĉeĥio) defendis sian diplumlaboraĵon "La konceptoj de universala lingvo kaj rilataj nocioj en ĉeĥaj enciklopedioj kaj vortaroj: interlingvistiko". Meze de la semajno freŝe el la presejo eliris la dua volumo de etvortara serio de *I. Koutny* pri Lingvo kaj Komunikado, kiu utilos en lingvistikaj studoj.

(*Laŭ Ilona Koutny*)

2.6 En la universitato de Vilnius

La 20-an de Novembro, 2003, en Kaunas okazis respublika scienca konferenco, organizita de la Fakultato de humanismaj sciencoj de la Vilnusa universitato, katedro de litova filologio de tiu fakultato kaj instituto de sociokulturaj esploroj de tiu fakultato. La temo de la konferenco estis "Teksto kaj kunteksto: formiĝo de senco". La temo estis diskutita laŭ interdisciplina koncepto, tial la konferencon partoprenis ne nur lingvistoj, sed ankaŭ literatursciencistoj, pedagogoj, historiistoj, filozofoj, sociologoj kaj psikologoj. La konferenco funkciis en pleno kaj en tri sekcioj. En la sekcio "Eksterlingvistikaj kunteksto" prelegis la sekretariino de Litova Esperanto-Asocio *Aida CIZIKAITE* pri "Uzado de frazeologismoj en Esperanto". Si instruas Esperanton en tiu fakultato kaj studas magistran fakon pri filologio. Entute estis faritaj 39 prelegoj. La konferenca materialo aperos kiel aparta libro.

(*Povilas JEGOROVAS*, litova.ea@mail.lt)

2.7 Studenta scienca konferenco en Riga

La 24-25-an de Novembro 2003 en la ĉefurbo de Latvio, Riga, okazis la 3-a studenta scienca konferenco sub la temo "Aktualaj demandoj de baltistiko". Ĝi estis organizita de la filologia fakultato de la Latvia universitato. La konferencon partoprenis reprezentantoj de diversaj universitatoj de Latvio, Litovio, Estonio, Pollando kaj Sankt-Peterburgo. La konferenco pasis en pleno kaj tri sekcioj. La 25-an de Novembro en la sekcio de lingvoscienco la sekretariino de Litova Esperanto-Asocio *Aida CIZIKAITE* faris prelegon pri la temo "Sistemoj de vokaloj en la litova kaj Esperanto". Estas eldonita broŝuro kun la tezoj de ĉiuj prelegoj de la konferenco. En ĝin ankaŭ eniris la prelego de *Aida CIZIKAITE*.

(*Povilas JEGOROVAS*)

2.8 En Potsdam: Pri mondlingvoj en Sankt-Peterburgo

De 23.-28.9.2003 en la universitato Potsdam (ĉe Berlin) okazis konferenco pri la temo "Sankt-Peterburgo kaj la 'akurata germano': germanoj kaj germanaĵoj en la alia rusa ĉefurbo". La konferencon organizis la Instituto por Slavistiko kaj la Germana Kulturforumo Orienta Eŭropo. Kadre de la aranĝo *d-rino habil. Cornelia Mannewitz* prelegis pri la temo "Germanaj kontribuoj pri la ideo de monda helplingvo en Sankt-Peterburgo".

2.9 13-a konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.

La 13-a konferenco de la germana Societo pri Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik) okazis de la 28-a ĝis 30-a de novembro 2003 en Berlin. Partoprenis 37 interlingvistoj kaj interlingvistike interesitoj.

Jenajn prelegojn oni prezentis (kun escepto de tiu de *Bertil Wennergren* ĉiujn en la germana) :

Bertil Wennergren: "Esperanto en la reto"

Andreas Emmerich: "Tradukproblemoj ĉe la ekzemplo de la romano 'La Mastro de la Ringoj' de Tolkien"

Dr. Věra Barandovská-Frank: "Ĉu planlingvoj apartenas al lingvoplanado?"

Prof. Dr. habil. Martin Haase: "Lingvoplanado en Vaskio"

Dr. habil. Sabine Fiedler: "Planlingvo kaj lingvo-ludo"

PD Dr. Rudolf Fischer: "Lingvoŝanĝiĝo ĉe la ekzemplo de la sufikos -i-"

Dr. habil. Cornelia Mannewitz: " Pri la germana Verein Deutsche Sprache"

Krome la brazila verkisto *Zé Do Rock*, loĝanta kaj verkanta en Germanio, prezentis siajn librojn, kiuj plenas de ironiaj germanaj lingvo-ludoj. (i.a.: "Deutsch gutt sonst Geld zuruck". München: Kunstmann, 2002, 256 p., ISBN 3-88897-297-3)

Johann Pachter prezentis kiel kutime riĉan libroservon.

La aktoj aperos en la jaro 2004.

(Gesellschaft für Interlinguistik e.V.: www.interlinguistik-gil.de)

3 Du novaj artikolaroj de GIL

Gesellschaft für Interlinguistik (GIL) en Berlin ĵus aperigis du novajn artikolkolektojn. La unua enhavas la prelegojn de la 12-a GIL-konferenco (2002). La dua enhavas la prelegojn de la interlingvistika sekcio de la internacia konferenco "ProCom" en Vieno, kiu okazis en 1998 memore al la 100-jariĝo de *Eugen Wüster* (kp. la raporton en la revuo Esperanto 10/98 kaj en IpI 26). Ĉar la aktoj de la unuopaj sekcioj ankoraŭ ne aperis, GIL aperigis tiujn kun interlingvistika enhavo :

Blanke, Detlev (2003, Red.): "Plansprachen und elektronische Medien". Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 6.-8. Dezember 2002 in Berlin. Interlinguistische Informationen, Beiheft 9. Berlin: GIL, A4, glubindaĵo, ISSN 1432-3567, 201 p., prezo 18 EUR + afranko.

Enhavo de Beiheft 9:

Věra Barandovská-Frank: Archiv- und Werkstattseiten für Plansprachen im Internet

Cornelia Mannewitz: Science-Fiction-Sprachen im Internet

Sabine Fiedler: Merkmale computervermittelter Kommunikation - dargestellt am Beispiel einer Comic-Fan-Gesellschaft

Bernhard Pabst: EBEA: Retrobibliographierung nichtmonographischer Literatur zum Esperanto

Ilona Koutny: Lexikographie und die Bedeutung eines Esperanto-Korpus
Karl-Hermann Simon, Horst Weckwerth, Klaus-Peter Weidner: Das „Lexicon silvestre“ als CD

Sven Siegmund: Die Tengwar - ein alternatives Schriftsystem

Rudolf-Josef Fischer: Sexusneutrale und sexusindizierende Bezeichnungen für Lebewesen

Klaus Schubert: Plansprachen und internationale Fachkommunikation

Claus Günkel: Sprachkybernetische Axiomatisierung und Berechnung von Lernerfolg

Andreas Künzli: Schwyzer, Debrunner, Funke & Co: Der Beitrag von Schweizer Linguisten zur Plansprachendiskussion

Jen la dua tiolo:

Blanke, Detlev (2003, Red.): Pro Com'98. Sektion 3 "Terminologiewissenschaft und Plansprachen" Beiträge der Internationalen Konferenz PROFESSIONAL COMMUNICATION AND KNOWLEDGE TRANSFER (Wien, 24 - 26 August 1998) Infoterm * TermNet. Interlinguistische Informationen, Beiheft 10. Berlin: GIL, A4, glubindaĵo, 160 p., ISSN 1432-3567, prezo 15 EUR + afranko

Enhavo de Beiheft 10:

Detlev Blanke:
- Vorbemerkung
- Pro Com 98: Eine Konferenz für Eugen Wüster
- Eugen Wüster und die Interlinguistik –
Auswahlbibliographie
- Terminology Science and Planned Languages

Wera Blanke: Probleme der Organisierung terminologischer Aktivitäten in Esperanto

Otto Back: Zur Esperanto-Wiedergabe lateinischer und griechischer Eigennamen in Wüsters Enzyklopädischem Wörterbuch

Sabine Fiedler: Eugen Wüster als Lexikograph: Rolle und Darstellungsweise von Phraseologie im Enzyklopädischen Wörterbuch Esperanto-Deutsch

Heinz Hoffmann: Möglichkeiten einer Plansprache bei zwischensprachlichen Begriffsunterschieden am Beispiel von Eisenbahn-Termini

Karl-Hermann Simon/ Ingward Ullrich: Prinzipien des multilingualen

Forstwörterbuches "Lexicon silvestre"

Wim M.A. de Smet: Nomoj de plantoj kaj bestoj en Esperanto: la konceptoj de Wüster kompare kun tiuj de aliaj terminologoj

Herbert Mayer: Zum plansprachlichen Nachlaß von Eugen Wüster in der Österreichischen Nationalbibliothek

Anhang: Pro Com 98 –Programm

4 Esplor-tekstaro realigata

"Esperantic Studies Foundation" (<http://esperantic.org/>) iniciatis la kolektadon de vasta Esperanta tekstaro por uzo de lingvistoj, vortaristoj ktp. La projekton realigas *Bertilo Wennergren*. La unua, eksperimenta fazo de la tekstaro estas nun malfermita al la publiko: <http://www.ikso.net/~bertilo/tekstaro/> .

Oni devas registriĝi por uzi la plenan tekstaron, sed la uzo mem estas tute libera kaj senpaga. La vortoj en la tekstaro ne havas gramatikajn etiketojn, sed la sistemo enhavas multflankan serĉilon kiu - danke al la strukturo de Esperanto - ebligas serĉojn ankaŭ laŭ gramatikaj kategorioj.

(Jouko Lindstedt en Bja-listo@helsinki.fi)

5 Varbu por IpI !

Por subteni interlingvistikajn kaj esperantologiajn aktivecojn kaj por doni aktualan kaj regulan informfonton, UEA disponigas ĉi-tiun *Informilon por Interlingvistoj (IpI)* senpage al tiuj, kiuj per abonilo petas la regulan ricevon de la bulteno. Do, vi povas kopii la lastan paĝon kun la abonilo, ĝin disponigi al eventualaj bezonantoj, atentigi aliajn homojn pri *IpI* aŭ alimaniere uzi ĝin por varbaj celoj.

**Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)
ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633,
fakso: ++ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snafu.de. Mendojn oni direktu nur al UEA,
kontribuojn nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur diskedo. Artikoloj sen indiko
pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi
pruvekzempleron. Bibliografiatas ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.
Pri CED vidu: www.esperantic.org. Materialoj ĉiam bonvenaj. ISSN 1385-2191**
